

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando. — Redakcio: Glorieta de Bilbao, 5.
Julio Mangada Rosenörn. — MADRID

III^a
JARO

NUM. I. — JANUARO

III^a
JARO



«La Salamandro» (Montserrat)

K U M I N O

- Diskreta duonmallumeco protektis la malriĉan ĉambron kontraŭ la varmega kaj sufokanta enaero de l'tago; la balkona sunevitilo projekciis sur la muron strekajn ombrojn inter kiuj, la ombroj de la branĉaro de l'pomarbo ŝajnis moviĝi kiel formikegaro. De tempo al tempo ia insekto eniris la ĉambron, zumbadis super la seĝojn de Vitoria (1), la skribotablon kovritan per notoj kaj super la ŝrankon plenan je libroj, kaj ĝi eliris al florhava ĝardeno, kvazaŭ timigite de la malagrabla silento kaj severa kvieteco de la ĉambro malriĉa kaj malgaja, kiel ĉelo de malliberejo. Poste, oni aŭdis nur la gratadon de la plumo de la maljuna instruisto sur la papero.

Kaŭze de du frapetoj aŭdiĝantaj timene de la pordo, la profesoro levis sian neĝkoloran kapon kaj tuj li diris post momento per mildega malrapida voĉo, multfoje parolinta al la infanoj kaj al birdoj: «Antaŭen!» La pordo malfermiĝis kaj ĉe la sojlo aperis la malgrasa maljuna servistino, la sola estaĵo akompananta la pedagogon.

—Kion vi deziras, Rozalio?—li demandis, daŭrigante la skribadon.

Ŝi ŝanceliĝis antaŭ ol respondi; sed fine ŝi diris decide kuraĝe:

—Via moŝto ne devas diveni, kiu petas permeson por paroli al vi.

—Ĉu viro aŭ virino petas tion?

—Virino.

—Nu; diru, kiu ŝi estas por ke mi tuj sciu.

—Ŝi estas... la «*Bilbokistino*.»

La maljunulo, kvazaŭ per risorto, subite, stariĝis. Jen li alta, malgrasa; la indigno starigis lin montrantan pastran indecon: liaj okuloj fulmis; lia mentono tremis, liaj pugnoj moviĝis nerve sur la skribotablo.

—Mi ne volas vidi ŝin! Ŝi foriru!—li ekkriis raŭke.

—Ŝi ja esperis tian vian decidon; eĉ mi avertis ŝin pri la neakcepto. Tamen, la kompatindulino rejesis ne forlasi la domon

(1) Hispana urbo, en kiu de antaŭ multe oni fabrikis tipajn seĝojn, kiujn oni eksportis ĉien.

gis kiam ŝi estos vidinta vin, kvankam oni celu ŝin elpeli trenate aŭ piedbatate.

La maljunulo pasigis la manon sur sian frunton, fermis la okulojn, rememoris okazintaĵaron; poste eksidis kaj kun la kapo inter la manoj, rezigne ekkriis:

— Enirigu ŝin.

Pasis silenta minuto. La postulantino eniris. Ŝi estis kvardekjara, malriĉega, maljunigita de malsato kaj de doloroj. Ŝi restis senmove ĉe la sojlo, kapklinigante planken. montrante sian nekombitan hararon, tordadante sian ĉifonan antaŭtukon per siaj maldikegaj fingroj.

— Sinjoro Ĵako — balbutis humilege kortuŝe la kamparano —, mi jam scias kiom multe ni suferigis vin, sed...

— Sed, kion? — malpacience interrompis la maljunulo.

— Sed mi havas filon, sepjaran infanon, kiu bezonas instruadon, kiu deziras veni al la lernejo; li estas senkulpa, pro nenio vi konsideru lin kulpa...

— Harpio! — kriegis la profesoro. — Ĉu ci kuraĝas peti, ke mi eduku cian idon, la idon de tiu, kiu mortigis mian, mian solan filon, la plenamaton de mia koro, mian konsolon, mian solan esperon? For, for de ĉi tie! Forpelu al la monto tiun lupidon, ke mi ne vidu lin, por ke mi ne lin disŝiru per miaj manoj kaj ĵetu liajn pecojn al cia vizaĝo, kiel pruvo pri mia senespero!

— Sinjoro — realparolis kortuŝege tremante la «Bilbokistino» —, estas vere, ke mia edzo batale mortigis la kompatindan Rafaelon, kiu estis... (mi ne volas ofendi vin) kiel preskaŭ ĉiuj filoj de homoj tro bonaj; sed mia edzo estis punata, kaj nun putriĝas li en malliberejo, dum mi restas tute sola, senprotekta, kun la etulo. Multfoje vi diris, ke oni neas instruadon al neniuj, kvankam tiu estu kulpa, kvankam tiu estu malbona... ¶

La profesoro stariĝis denove, nerve etendis la brakon al la pordo samtempe imperative ekkriis:

— For de mia vido!

Tia estis la gesto kaj sintenado de la maljunulo, ke la «Bilbokistino» eliris.

Sinjoro Ĵako sin direktis febre, ŝancele al unu el la muroj, malpendigis portreton, ŝmacis ĝin kaj ekkriis:

—Mia karulo! Ne estos pardono por ciaj murdintoj. La kulpoj de la gepatroj persistados ĉe la ĵiloj ĝis la kvina generacio!

Jen la tre gaja kaj bonodoranta, pro parfumo de la kamparo, kampo apud la lernejo! Grandaj juglandarboj, centjaraj kverkoj, ŝirmis ĝin per siaj foliplenaj branĉaroj kontraŭ la rostantaj radioj de la suno. kaj tre freŝa herbetaĵaro estis al ĝi kvazaŭ tapeto nuancita de krizantemoj kaj senkulturaj lekantoj.

Dum la suntagoj, sur la kampo, okazis la disvolvigo de la lerneja laboro; tie la infanoj ludis kaj kuris tien kaj reen; tie Sinjoro Jako atentis kaj instruis ilin tiel diligente, kiel patrino.

Ian matenon, la profesoro, ĵus fininte la disdonadon de la matenmanĝo, vidis malproksimen de la lernantaro starantan apud arbo piednudan infanon duonvestitan per pantalono subtenata de sola ŝelko, kun la kapo preskaŭ razita kaj la okuloj larĝe malfermitaj pro surprizo kaj timo, kvazaŭ li havus samtempe deziron kaj malkuraĝon por alproksimiĝi al la lernantoj.

La koro de Sinjoro Jako batis forte.

Tiu—li pensis—, tiu estas la filo de la murdinto.

La instruisto ŝajnis ne esti vidinta lin. Vespere la infano revenis, kaj la instruisto sin kondukis al li same indiferece; kaj tute same okazis dum ok sinsekvaj tagoj. Je la naŭa, naskiĝis ĉe la instruisto deziro koni la infanon, eble por sperti la doloron de la memturmento; kaj tial, li parolis al unu el siaj disĉiploj, komisiante lin por alvenigi la filon de la «Bilbokistino».

La lernanto rigardis la etulon kaj ŝvingis la brakojn suprenmalsupren kriadante laŭtege:

—«Kumino», venu! «Kumino», venu!...

La infaneto alproksimiĝis malrapide nefideme, eble timante esti elpelota el tia infana paradizo, ĉar li estis la konstanta ekzilo el ĉiuj plezuroj. La instruisto pala kaj preskaŭ svenante, vidis lin antaŭeniri, kaj fine fermis la okulojn ĝis kiam lia koro anoncis, ke la filo de la «Bilbokistino» estis alveninta. La instruisto rigardis lin atenteme: lia larĝa frunto diris pri lia inteligento; liaj trajtoj estis harmoniaj; de liaj okuloj elradiis nobla rigardo. Estis nekompreneble! La sovaĝbestoj ankaŭ naskas belajojn! Satano ankaŭ estis bela!

Ĉu cia nomo estas «Kumino»?—demandis Sinjoro Jako, nes-
ciante kion diri.

—Ne, sinjoro—respondis la infano—. Mia nomo estas An-
ĝelo Garai, por servi Dion kaj vin, sed tiuj—li ridete aldonis,
rigardante malice la infanaron kaj gracie balanciĝante dekstren
—maldekstren sian korpeton—, tiuj alnomas min «Kumino»,
ĉar mi estas malgranda, sed, kiel la alnomo estas bela, mi ne
ĉagreniĝas pro tio.

La instruisto pli paliĝis. Ĉe lia brusto batalis kompato kon-
traŭ venĝdeziro.

—Kion ci volas? — la instruisto demandis —. Ĉu legi, ĉu
lerni?

Mi jam scias legi—respondis «Kumino»—kaj ankaŭ skribi, su-
mi, subtrahi kaj desegni azenetojn, ŝafidojn kaj akridojn.

La infana rondo ridegis hore.

—Sed kiu instruis al ci tion?—demandis la profesoro sci-
voleme.

—Mi mem, sub la suna lumo.

—Kia aĝo esta cia?

—Mi estas sepjara.

—Bone—malgaje senkuraĝe rediris la instruisto—. De mor-
gaŭ ci povas veni ĉi tien kaj eniros la lernejon. Mi donos al ci
kajerojn, kraĵojn, matenmanĝon kaj vespermanĝeton, kiel al
ĉiuj., Prenu... Aĉetu nigran kitelon. Sed neniam ci cin metu
kontraŭ mi, ĉiam flanken de mi, ĉu ci komprenas?

«Kumino» estis tre amata de siaj kamaradoj kaj la plej lerta
el ĉiuj; neniam oni aludis lian malliberigitan patron; ankaŭ ne-
niam oni aŭdis la malhonorigantan alnomon «Bilbokisto» eĉ
hazarde sed ĉiam «Kuminon. Li fariĝis nepra en la lernejo. De
post unu jaro aŭ iom pli, kiam lernanto ajn forgesis ion, iu el
la ceteraj kutimis diri:—«Kumino» diru tion!

Kaj «Kumino» ĉiam solvis la aferon. Nedubable! Serioza,
preskaŭ komika pro tia seriozeco nenatura al malmultjara infan-
o. Oni rimarkis, ke li legis kaj parolis elkore. La profesoro,
finē, imitis siajn lernantojn, kaj kiam neniue ili sciis ian res-
pondon, li paroletis sopire:—«Kumino», diru tion!

Iam okazis io neordinara. La antaŭan nokton, la vento surĵe-

tis sur branĉon de arbo ŝtofĉifonaĵon el eluzita vestaĵo de kamparano, kaj tiamaniere alkroĉigis al la branĉo la ĉifonaĵo, ke ĉi tiu kovris tutplene neston de kardelo. La gekardeloj vane penadis por elŝiri la ĉifonaĵon el sur la nesto por liberigi la kardelidojn; obstine dum multe da tempo penadis sensukcese la gepatroj, kiuj senespere pepegis kaj pikadis. Subite, «Kumino» grimpis sur la arbon, eĉ rampis supren en la altan branĉon spite de la granda danĝero, fortiris la ĉifonaĵon, aranĝis la neston, kaj malsuprengrimpis ridetante kun vizaĝo, manoj kaj piedoj sangelversantaj, kaj tamen gaje dirante:

— Por ke la idoj vidu siajn gepatrojn, kaj la gepatroj trovu sian idaron.

Sinjoro Jako metis sian tremantan manon sur la preskaŭ razitan kapeton de la savinto kaj ekkriis tre malĝoje:— «Kumino», ĉi estas bonkora!

La profesoro sentis konsciencan riproĉon ĵus eldirinte tion, kiel se la ombro de lia sola filo, de lia amata filo, mortigita de krimulo, elstariĝu antaŭ li por lin riproĉi. Li estus preferinta, ke la infano estu malbonkora.

«Kumino», fine, estis necesega al li, ĉar li ne havis familion, lia izoleco enuigis lin. «Kumino» ordigis liajn notojn, purigis lian ĉambron, plenigis da inko la inkujon kiam necese, suprenlevis kaj male la sunevitilon, helpis la profesoron, instruante la mallertulojn, ofte donis sian vespermanĝeton al iu infano tiel malriĉa, kiel li. Fojon, la instruisto malsaniĝis kaj «Kumino» flegis lin dum tri tagoj.

Li eksentis al la infano patran amon kaj samtempe sin riproĉis pro la eksento, konsiderante ĉi tiun nepardoninda kulpo. Iam, kiam «Kumino» dekjariĝis, je la nomfesto de la instruisto, «Kumino» helpis Rozaljon por aranĝi la manĝotablon de la profesoro. Li modelis belegan pokalon el argilo, kiun li plenigis el kampaj floroj kaj metis ĉe la centro de la manĝotablo kovrita jam de la tablotuko.

La pedagogo eksidis kaj la infano adiaŭis lin afable ĝentile.

— «Kumino» — balbutis ŝvitante la instruisto —, mi volas, ke ci sidu ĉe la tablo kun mi.

Li bedaŭris tute sekve esti dirinta tion, sed jam li ne povis aranĝi la okazintaĵon. La infano metis telerojn kaj manĝilaron

sur la tablon kaj eksidis kontraŭ li; ĉi tiu babiladis, ridis, rakontis historiaĵojn kaj spritajn anekdotojn ĉiam ĝentile kaj plenrespekteme. De antaŭ multe da tempo ĝis tiu tagmanĝo, Sinjoro Jako ne sentis sin tiel konsolate; li estis preskaŭ gaja, kontenta pro la bono farita, pro la kora dankemo elmontrita de «Kumino».

—Kion ci farus, «Kumino», se ci estus justema reĝo kaj ci devus premii virtojn kaj puni krimojn?—diris la instruisto.

—Ha, ha, ha!... Mi, reĝo!—ridegante ekkriis la infano—. La problemo estas facila: «Kumino» 1^a eksreĝigus.

—Sed, ĉu se oni ne permesus tion al ci?

—Mi—respondis rapide la filo de la «Bilbokistino»—. mi pardonos ĉiujn vivantojn, por ke ĉiuj mortintoj benus min.

«Kumino» dekdujariĝis, kaj jam li forlasis la lernejon. Lia patrino grave malsaniĝis pro kio li anstataŭis ŝin por la laboro, kiun ŝi faris: la knedado, sed por la malgranda infano ĉi tiu laboro estis tro peniga. Krom tio, li vespere kaj nokte tlegis la malsanulinon. Alveninta letero pligrandigis lian malĝojon: lia patro ĵus mortis en la malliberejo de Santoña, kies estro oficiale komunikis la malfeliĉan novaĵon, kiun li kaŝis al la patrino. Ĉiutage Sinjoro Jako alkuris al la hejmo de la infano por informi pri la sanstato de la malsanulino, sed li neniam preterpasis la enirejon de la hejmaĉo, kiun li juĝis malbenita. Fine la malsanulino mortis, «Kumino» ŝin vestis kaj ŝin akompanis al la tombejo.

Ĉiuj infanoj de la lernejo akompanis «Kumino» al la enterigo, kaj Sinjoro Jako, de malproksime, kiel fantomo, kiel doloranta ombro postiris la funebran procesion.

Ian vesperon, kiam Sinjoro Jako verkis siajn temojn, la por-do malfermiĝis kaj la infano aperis;

—Ho, Anĉjo!—ĝemante ekkriis la profesoro, karesante lian intelligentan kapon—, ho, kara infano! Nun, kio estas al ci?

—Mi ne scias—tre malĝoje respondis «Kumino»—. Mi laboros..., iros al terkulturejo..., gajnos honeste mian panon...; mi soldatiĝos... aŭ mi elmigros al Ameriko...

Eknotiĝis. La sonoriloj de iu preĝejo batis la Ĝangeluson; melankolia ombro invadis la ĉambron kaj ekmalhelpis vidi la

manĝotablon ĵus preparitan, sur kiu je tiu okazo ne staris bukedo, sed kuŝis ekzempleron de l'Evangelioj.

Sinjoro Jako prenis la libron, iris en la fenestron, kaj legis, pli ĝuste divenis:

«Se iu humiliĝos kiel tiu infano, li estos la plej granda ĉe la ĉiela Regno.»

«Kaj kiu akceptos la infanon je mia nomo, tiu akceptas min.»

«Kumino» forviŝis la larmojn per la pinto de la kitelo kaj diris sopirĝemante:

—Adiaŭ, Sinjoro Jako, ni ne vidos plu unu la alian!

—Ne!—ekkriis la instruisto—. Ci ne foriros; ci restos kun mi; ci estos mia konsolo dum la maljuneco, kaj kiam mi mortos vestos min, kiel vi vestis cian patrinon.


La infano sin jetis en la brakojn de la instruisto, plenlarman-te kaj kaptite de profunda emocio.

Poste la profesoro sidigis la amatan lernanton apud li mem kaj per tremanta preskaŭ neaŭdebla voĉo murmuris: — Dento po dentol Filo po filo!

Rozalio eniris kaj ekbruligis lampon.


Hispane verkis: *Antonio Zozaya*

Esperante tradukis: *Fernando Redondo*



GRAVA RIMARKO

Dezirante elpruvi utilon de nia Unuiĝo, ĉiu aliginto al HEA. povos akiri la kolekton el jenaj verkoj: «El Esperanto al alcance de todos» (1,50), Pri Hispanujo kaj Ĝiaj Popolkantoj k. c. (1,00). Ferdinando VI kaj Farinelli» (0,75), «Avila» (1,00), «El Moderna Hispana Parnaso» (1,15), «Du junaj Fraŭlinoj» kaj Korneliino» (1,50), kaj «Don Kihoto» unua kajero (0,60), per la duono de la prezo, t. e., sendante *tri pesetojn 25 centimojn kaj plie 40 centimojn* por la poŝtrekomendita afranko. Antaŭpagu, sendante la monon kaj dirante la numeron de la membrokarto, eĉ per poŝtmarkoj, al S-ro Mariano Mojado, Sekretario de HEA.—strato Abascal, 13.—Madrid.



Roko nomata «Frigia Ĉapo (Montserrat)

MONTSERRAT

(NIAJ BILDOJ)

La fama montareto Montserrat staras je la sudo de Manresa kaj proksime de Barcelono, kies aspekto estas tiel speciala, ke nur estas alia simila en la mondo staranta ĉe insulo el la Antiloj kaj kies nomo estas ankaŭ Montserrat pro tio. Ĝia plej alta pinto estas 1236 m. alta.

Ĝin formas krutegaj kaj konusformaj ŝtonegoj, prezentante mallarĝajn kaj malfacilajn enirejojn. Suben la deklivoj estas kulturitaj por la vinbero kaj cerealoj, kaj prezentante ĉe la supro de ĉi tiu parto kvazaŭ ŝtupojn; en la meza parto kreskas abundaj foliplenaj arboj, arboj kaj plantoj, sed ju pli oni supreniras des malpli da kreskaĵoj oni vidas, kaj ĉe la supro nur estas altaj rokegoj kvazaŭ kolonoj, piramidoj, kapricaj ŝtonegoj, altaj eĉ je 150 piedoj.

La roko estas konglomerato el argiloj kaj kalkaj sabloj, ĝenerale griza, sed ankaŭ ruĝa kun iuj blanketaj franĝoj; la konglomerato estas pli kompakta supren. La montareto preskaŭ estas izolita. Estas rimarkinde vidi ĉe la supro nombrajn putojn naturajn; ĉe la subo estas grotoj, viziteblaj ĉar enirejo estas apud la vilaĝo *Collbato*, kaj eble ankoraŭ ne tute esploritaj kaj aranĝitaj por la turismo, kvankam vizito estas tre interesa, ĉar ili formas labirinton el kvazaŭ subteraj ĉambroj, mallarĝaj galerioj, putoj, fendegoj kaj truoj: en la unua ĉambrego staras ŝtonegoj, kolonoj kaj piramidoj konfuzamase; dekstren malfermiĝas galerio kun stalaktitoj sed ne nombraj; maldekstren, tra mallarĝa irejo, oni atingas vastan groton kun kupolo de kiu pendas nombraj dikaj stalaktitoj kaj kvazaŭ piramidoj inverse metitaj, en la fundo estas fendego profunda je 20 m. proksimume. Malsuprenirante tra la fendego, kaj irante tra mallarĝa koridoro aliras la vizitanto al duoncirkla groto kun la muroj kaj arkaĵo kovritaj de la sinsekvada ago de la Naturo dum jarcentaro el abundaj stalaktitoj, formantaj en la volvo kvazaŭ kurban bele ĉizitan plafonon. De ĉi tiu groto iras en alian, kiu ŝajnas klaŭstro de monaĥejo pro siaj altaj kolonoj, kies arkaĵo estas kvazaŭ tranĉita nordorienten, kaj ĉe la fundo oni vidas alian groton, la plej belan pro la abundegaj stalaktitoj. Alia groto proksima entenas grandan ŝtonon, kiun oni nomas «elefanto» pro ĝia

formo, kaj kiu staras ĉe la centro; ĉi tiu groto entenas ogivan arkon belegan, grandiozan. De ĉi tie, malsuprenirante tra la «Buŝo de la infero» kaj tra zigzaga galerio, oni alvenas al groto en kiu ŝtonaj masoj aperas ĉe la duonombro kvazaŭ gigantoj survestitaj de ampleksaj manteloj. Ankoraŭ estas aliaj negravaj grotoj sinsekvaj kiuj estas rifugejo de multenombraj vespertoj, kaj poste suprengrimpante amason da ŝtonoj oni atingas la lastan groton, kiu estas ronda je 6 m., eksterordinare alta, en kiu oni vidas faskojn el kolonoj, kolonarojn, graciajn arkojn, belegajn pendantaĵojn kaj filigranonel de likataj longaj pikiloj, ĝi tial estas kvazaŭ grandioza absido de gotika templo.



NOVA FIZIKA TEORIO

«Etero ekzistas kaj la elektraj fenomenoj estas nure meĥanikaj» estas verko de l'ingeniero, scienca d-ro kaj profesoro en la Lernejo de Industriaj Ingenieroj de Tarrasa (Hispanujo), S-ro Felikso Apraiz, per kiu li elmontras rimarkinde originale novan fizikan teorion, kiu malfermas novajn vojojn al la Fiziko.

Li atakas kuraĝe la grandajn enigmojn de la fizika Universo. «Materio, Elektro, Etero, Tempo kaj Spaco», estas nur por li «Tempo kaj Spaco», per kio la Fiziko kaj la Meĥaniko fariĝas Geometrio pri la movoj ne studanta la kaŭzojn de la movoj, kaj pli vasta, ol la nuna Geometrio.

Ciam Materio kun la Tempo kaj la Spaco estis mistera kaj neatingebla triunuo, kiun oni ampleksigis de antaŭ ne malproksima epoko per malkaŝo de moderna magiistino: la Elektro kun ĝia akolito la Magnetismo.

Sed la homo, ne satigite de ĉi tiuj problemoj, kiuj prezentiĝas al lia intelekto tra la pordoj de la sentoj; konsciis necese atenti novan elementon: la Eteron, kiu rilate la Materion estas same, kiel la animo rilate la korpon, tiel enigma kiel ĉi tiu, kaj plie kun ekzisto logike kontraŭa «almenaŭ ŝajne».

La firma bazo de la teorio de Apraiz estas la reala stato donita de li al la Etero kaj al la Elektro, kiu laŭ la sama teorio, tutajas la Eteron.

Apraiz ne konsentas kun la fanatikaj relativistoj neantaj la ekziston de l' Etero, kaj kun tiuj relativistoj konfesantaj «nescii» la ekziston, Kaj estas dece konstati, ke Einstein mem malaprobis tiajn konkludojn de siaj partianoj, kaj eĉ li modifis siajn unuajn asertojn nefavorajn je la ekzisto de l' etero, kiuj aperas sur lia broŝuro «La Etero kaj la Relativeco».

Laŭ la teorio de Apraiz, la etero pleniganta la spacon konsistas el atomoj, kaj ĉiu el ĉi tiuj konsistas siavice el du elementoj (elektronoj): unu kun pozitiva elektro; la alia kun negativa. La kunstaro de ambaŭ elektronoj ĉe unu loko mem de la spaco produktas rezulton tute strangan: la ŝajnan nuligon (koncerne nian vidon, nian atentkapablon) de la tuto. Unuvorte: la du elektronoj estas la etero, kiu estas... la vakuo. Kiel oni povas klarigi ĉi tion? Jen: pozitiva elektrono estas nur movo el tiuj, kiujn la Meĥaniko nomas *trenantaj*; la negativa elektrono estas sama movo kaj samtempe mala sed relativa. Same, kiel ĉe la cirko ĉevalo galopas sur turniĝanta tablo ne antaŭenirante paŝon... koncerne la rigardanton, okazas rilate al la elektrono; la tablo estas la negativa. Kaj tial ke la rezultanta movo estas nula, kaj ke ĉi tiu movo estas la esenco de la materio, la homo nur perceptas la vakuan en la loko mem, kie disvolviĝadas neimageblaj rapidecoj. Kaj la aŭtoro elpruvus sian teorion per tute simplaj hipotezoj dirante per la prologo: «Institucioj kaj Gazetoj sciencaj refutis miajn hipotezojn pri la etero kaj la elektro, dirante, ke ili ne staras sur demonstraĵaj pruvoj. Mi dirus eĉ pli, ĉar mi kredas ilin neelpruveblaj same, kiel ĉio, kio, rilatante primitivajn kaŭzojn, deiras nepre necese de intuiciaj kaj nediferencigeblaj konceptoj (pri mia afero, la kompleksaĵo el tempo kaj spaco rezultiganta la movon).

»De la sama speco estas la postulatoj («bazo» ili mem) sur kiuj staras la Matematikaj Sciencoj, kiujn, tamen, oni aljuĝas *eksaktaj sciencoj*. Kaj kial tiel kvalifiki ĉi tiujn sciencojn, ĉar okazas al ili same, kiel al idolo, kies piedoj estis el koto?

»Ilia nediskuteblan certecon oni altrudas al ni per ne rekta pruvo: la certeco de ĉiuj sekvoj devenantaj de tiuj postulatoj.

»Mi petas por miaj hipotezoj saman konduton kaj tiel certe mi elpruvos ilin, ĉar multenombraj fenomenoj kaj leĝoj, konataj nur kiel eksperimentaj, estas deduktataj ĉe mia teorio sen alia helpo pli, ol tiu de la Meĥaniko.

»Mi kredas, ke mi trovis meĥanikan interpreton pri la Elektro, kaj ŝajnas superflue pritrakti «ĉu povas ekzisti aŭ ne» tiu interpreto. Sed pri ĉi tio oni verkis, parolis kaj diskutis multe, kaj tial, por konkludi, pri la divido de opinioj, ion mi diras:

»Rankine, Oswald, kaj aliaj fizikistoj de la pasinta jarcento same, kiel multaj el la modernaj relativistoj, sin montras tute kontraŭaj je ĉia meĥanika interpreto pri la elektro, kaj eĉ iu jesis (Louis Rougier, «La Materiligo de la Energio») ke «ĝis nun oni ne atingis klarigi meĥanike la plej simplan elektran fenomenon», nuligante tiel la laborojn de Maxwell, Kelvin, Thomson kaj Lodge.

»Ĉi tiuj kaj aliaj ne malpli eminentaj, kiel Appell, Dunhem, k. c., estas, male, fervoraj meĥanikemanoj; kaj ne forgesu (kun permeso de la Metafiziko), ke estas pli malfacile jesi (logike), ol nei.

»Ekzistas ankaŭ partio el eklektikuloj (ne kalkulante la specialan eklektikismon de H. Poincare, kiun refutas Darboux), por kiu la problemoj ne estas enirigi la Elektron en la kampo de la Meĥaniko, sed enirigi unu kaj alian en la komuna tuto de nova scienco, kies principoj oni aplikos al ambaŭ disciplinoj.

»Kvankam iom nepreciza ĉi tiu vidpunkto ne estas malproksima de tiu de la meĥanikemanoj; sed mi ne konsentas kun ĝi koncerne detalon pri scienca metodologio. Tiu nova scienco (kiu laŭ mia opinio nur estas la Geometrio) povas enteni la Meĥanikon, sed la Meĥaniko entenas siavice la Elektron, ĉar ĝeneralajo entenas partikularaĵon.

»Se oni konscius Meĥaniko tiun, kiun konis Newton aŭ Laplace, tute klare ĝi ne povus enteni la Elektron; sed kiam oni firme asertis, ke iu scienco havu limon netransireblan? La modernaj progresoj de la Meĥaniko estis tiel grandaj, kiel tiuj de la Elektro, kvankam ĉi tiu estu nin miriginta pli ol tiu. Kaj tamen, la Meĥaniko pri la fluidoj estas en la infaneco ankoraŭ. Ĉu estas strange, do, ke same okazu al la Meĥaniko pri la Elektro? Kaj neniuj konscios tial ke la Meĥaniko pri la fluidoj devas esti aparta scienco, sed kvazaŭ ĉapitro de la ĝenerala.

La Meĥaniko estis, estas kaj estos la scienco pri la movo, kaj ĝia primitiva kaj vasta kampo etendiĝas nature al partikularaj movoj formantaj la Elektron.»

DEL EXTRANJERO

DECLARACIONES INTERESANTES

El doctor checoslovaco Béhounek acaba de hacer interesantes manifestaciones sobre la intercomprensión con motivo de su participación en la expedición Nobile al Polo Norte, cuyo trágico resultado es conocido de todos. En sus manifestaciones pone de relieve las grandes dificultades provenientes de la diversidad de lenguas habladas por los expedicionarios, causa de importancia extrema en las dificultades para los trabajos de salvamento, que no pudieron impedir trágicas consecuencias; así, manifiesta que se entendía en inglés con el general Novile, con el sueco Malmgren lo hacía en alemán. Muy pocos italianos podían expresarse en francés, pues la mayor parte de éstos no podían expresarse más que en su lengua patria. Los primeros radiogramas pidiendo socorro, emitidos en italiano, y captados por una estación rusa, no fueron comprendidos.

Cuando por fin el rompehielos ruso «Krasim» llegó en socorro de parte de los expedicionarios, la alegría de éstos se desbordó, pero tan sólo Behounek, hablando alemán, pudo entenderse con algunos marineros rusos; los italianos no podían hacer otra cosa que demostrar su agradecimiento sonriendo.

Al hacer manifestaciones el doctor checoslovaco, le fué presentado un ejemplar de la obra de Odd Anesen «La Tragedia del dirigible Italia», traducida del noruego al esperanto y de esta lengua al checo, y habiendo hojeado esta última traducción expresó su admiración por la veracidad de los hechos, que él vivió, manifestando que una traducción directa del noruego al checo no hubiera sido más fiel y expresándose ferviente partidario del esperanto.

EL ESPERANTO Y LA ESCUELA

La dirección de las Escuelas medias de St Gallen (Suiza), aprobó la apertura de cursos de esperanto, habiendo empezado a funcionar uno bajo la dirección de la profesora S-ra A. Dietrich.

El Consejo de Instrucción Pública de la ciudad de *Graz*

(Estiria-Austria) decidió introducir la enseñanza del esperanto en todas sus Escuelas, habiendo empezado ya cinco cursos con 300 alumnos de las 3.^{as} clases. El inspector señor Storm dirige estos cursos en unión de la profesora señora Schwarz.

En el reciente libro «Moderna reforma de la Escuela», de que son autores los profesores y doctores Alfred Grotjahn y Gustav Junge se lee lo siguiente:

»Si se quiere hacer comprender a los niños sin esfuerzo alguno la lógica de la lengua, se deben utilizar los elementos de una lengua artificial exactamente construída, cual es la lengua auxiliar internacional esperanto.

»El alumno, que la aprenda, ejercita con el aprendizaje, prácticamente, la lógica lingüística y hasta goza de su utilidad para, sin conocimiento de lenguas vivas extranjeras, hacerse comprender en las relaciones internacionales.

»De 1887 existe el esperanto, creado por el médico varsoviano Zamenhof, hoy difundida en más de 80 países, calculando 60 revistas y 6.000 volúmenes literarios.

»Se caracteriza por su construcción extremadamente lógica y sus muy pocas reglas gramaticales, que orillan toda clase de anomalías.

»Toda vez que no podemos satisfacer la necesidad de tener una lengua internacional haciéndola de la lengua inglesa por razones de sentimiento y por lo difícil de su comprensión por medio de la radio, precisa hacer todo lo posible por acelerar el triunfo del esperanto. Su difusión no es un peligro para las lenguas patrias, sino al contrario, pues por su estudio se mejora el de aquéllas, y ahorra el tiempo hoy dedicado a tres o cuatro lenguas antiguas y nuevas solamente para conocer éstas fragmentariamente. ¿Cuántos intelectuales académicos en general están capacitados para hablar su lengua nativa con una fonética exacta y una corrección máxima desde la cátedra de la oratoria, o para escribirla literariamente? Pocos, muy pocos; pero serían muchísimos más si el tiempo malgastado en adquirir elementos griegos, latín, francés o inglés, lo hubiesen dedicado a la propia lengua. Esto sería posible si se introdujese con carácter obligatorio en los programas oficiales la enseñanza única del esperanto como lengua extraña, la que proporcionaría al alumno el mejor medio de llegar a la lógica lingüística que en todas

las llamadas lenguas naturales está llena de excepciones, anomalías, errores, incorrecciones, etc. La escuela popular también avanzó ya en este camino, pues el esperanto se enseña ya en más de 200 escuelas alemanas.»

EL ESPERANTO Y EL CINE

Dos importantísimas Compañías dedicadas a la impresión de películas en los Estados Unidos, acaban de realizar ensayos para la aplicación del esperanto a la película hablada. La Metro-Goldwyn Meyers haciendo la propaganda del esperanto mediante la impresión del discurso en inglés del señor Parish con algunas frases esperantas; la Paramount, impresionando el diálogo en esperanto entre el presidente de la Asociación esperantista de los Estados Unidos y la señora Chomette. Seguramente son de esperar excelentes resultados de estas pruebas.

EL ESPERANTO AUXILIA LA EDICIÓN DE UNA GRAN OBRA

La poderosa editorial checoeslovaca «Orbis» de Praha, lanzó ha poco al mercado en lengua checa «En dirigible al Polo Norte-La Tragedia del Italia», cuyo original es del escritor noruego Odd Arnesen, viniendo esta obra a informar completamente al público sobre la trágica expedición Nobile. El libro, lujosamente editado, está profusamente ilustrado y cuenta, además, con una valiosa carta geográfica, habiendo despertado un gran interés en el pueblo checo.

La traducción fué hecha del esperanto al checo por nuestro *samideano* Otto Ginz, valiéndose para ello de otro *samideano* noruego, Sr. Jens Schjerve, que había traducido el original noruego al esperanto a consecuencia de habérselo pedido el Sr. Toki Zenmaru, redactor del gran diario japonés «Tokio Asahi Shinbun», para editar el libro en japonés.

Sobre el título de la obra aparece: «Traducida al checo por Otto Ginz del texto esperanto de Jens Schjerve», con lo cual la propaganda en pro de nuestra lengua ha de ser importante por medio de obra de tanto interés, y muchas personas llegarán a convencerse de la gran utilidad del esperanto para estos

asuntos editoriales, sector importantísimo en el campo de la actividad humana contemporánea.

IMPORTANTÍSIMO DOCUMENTO

Los representantes oficiales de los gobiernos del Brasil, de Checoeslovaquia, de China, de los Países Bajos, del Principado de Liechtenstein y del Estado de Michigán, de los Ministerios de Comercio y del Trabajo de Rumanía, que asistieron al XXI Congreso Universal de Esperanto en Budapest, convencidos de que esta lengua neutral puede ser prácticamente empleada, paralelamente a las lenguas nacionales, en las reuniones generales, profesionales, científicas y pedagógicas, y en toda clase de conferencias, se han dirigido en un documento, suscrito por todos, exponiendo los extremos expuestos y aconsejando sea aceptada la lengua esperanto, a sus respectivos gobernantes y a los de otros pueblos.

UN EMBAJADOR Y EL ESPERANTO

En el Japon el esperanto progresa de un modo notabilísimo en todas las clases sociales, pues sí, según expresión de un eminente profesor universitario de Nagasaki, a los japoneses cultos les cuesta el inglés, lengua la más fácil para ellos, seis cursos, y el esperanto uno solo, y los poco instruidos pueden aprender ésta en dos o tres cursos rápidos a lo sumo, es natural aquel progreso; pero ha venido a dar un gran impulso al movimiento esperantista japonés la permanencia del embajador de Finlandia, Sr. Ramstedt, en el Japón, expresándose así los japoneses: «Como posee admirablemente el esperanto, su presencia entre los esperantistas japoneses se traducía en una enseñanza, en un estímulo, por patentizarse clarísimamente una demostración práctica de la utilidad de esta lengua, arrastrando en consecuencia un feliz desenvolvimiento del esperanto en la cantidad y calidad de las personas que han ingresado en él.»

LA CASA DEL ESPERANTO

Nuestros samideanos de París llevan felizmente adelante su Casa del Esperanto: a los 50.000 francos del incansable propa-

gandista, simpatiquísimo samideano y mecenas de todo cuanto significa progreso y aproximación de los pueblos, Sr. Ernest Archdeacon, y a los 10.000 del Sr. Henry Farman, saltando por los numerosos donativos, si bien menores en cantidad no inferiores en estimación y significación, hay que sumar otros 50.000 francos de un generoso y anónimo donante. Que cunda el ejemplo entre nuestros compañeros franceses; que imitemos a los franceses en todas partes, es de desear.

OPINIONES SOBRE EL ESPERANTO

Jean Sapéne, director general y redactor jefe de «Le Matin», con ocasión de su breve estancia en Budapest, fué entrevistado acerca del esperanto y se expresó así: «La Unión Europea necesita una sola lengua; pero ninguna de las lenguas europeas puede servir para desempeñar ese papel, pues la supremacía de una lengua europea arrastraría consigo encontrados sentimientos nacionalistas que se considerarían ofendidos.

El esperanto completamente eufónico, de fácil aprendizaje, paréceme el más conveniente para tan noble objetivo como es que los pueblos unificados en una liga de solidaridad se entiendan recíprocamente pudiendo llegar a profundizar en sus almas respectivas.»

De Wilhem Miklas, presidente de la República austriaca son las palabras que entresacamos de su reciente discurso al inaugurar oficialmente en Viena el Museo Internacional de Esperanto: «El esperanto sirve no solamente para facilitar la intercomprensión de los hombres de hablas diferentes en la práctica de la vida, sino también para activar el cambio de ideas y opiniones en el campo de la civilización y en el de la economía. Se debe uno a todo cuanto supone facilitar la unión de los pueblos, por eso no puede uno dejar de ser partidario del medio representado por el esperanto, lengua fácil de aprender y fácil de ser comprendida por todos.»

Sobre «Le Matin» ha dicho Louis Forest: «El mundo se transforma en derredor nuestro de una manera vertiginosa de la que no nos damos cuenta. Fenómeno semejante al que nos ocurre con nuestra existencia sobre la tierra en relación con la

marcha de ésta por los espacios celestes, de que no nos apercibimos.

La T. S. H. está en condiciones de cambiar las costumbres y eso que apenas está en sus comienzos. Aún no ha hecho más que empezar su historia y ya obliga al examen de importantísimos problemas, de los que basta citar uno: la necesidad de una lengua universal. ¿Hasta cuándo van a continuar las burlas hacia los esperantistas y el esperanto? ¡La T. S. H. les reserva una gran venganza!»

El Sr. La Fontaine, vicepresidente del senado belga, acaba de manifestarse acerca del Esperanto de la siguiente manera: «Es el esperanto una lengua regular con el encanto de una sonoridad agradable. Puede expresarse con ésta lengua cuanto se quiera, puesto que en ella se encuentran traducidos toda clase de escritos, tanto literarios como científicos. La prueba, pues, está hecha. Los pueblos darían un gran paso en su progreso y aproximación aceptando el esperanto, usándolo y perfeccionándolo a medida que las circunstancias lo necesiten, perfeccionamiento que será totalmente normal mediante el uso, del mismo modo que ocurra con nuestras lenguas vivas. Es indudable que el francés de hoy no es aquél de Rabelais ni de Montaigne, que leen con placer los que lo saben comprender; ni aquél de la señora de Sévigne y de Molière, que no está al alcance de todos. El esperanto se perfeccionará con el uso; pero es preciso ante todo adoptarlo y emplearlo.

La necesidad de la intercomprensión de los pueblos se hace cada vez más imperiosa. Si así lo podemos conseguir mediante el esperanto, es absurdo no decidirse a adoptarlo.»

La señora María Vérone dice en *L' OEUVRE*: hay ya por el mundo millones de personas que hablan y escriben el esperanto, pues los esperantistas están repartidos por doquier, en todas las latitudes y en todos los medios sociales. Un gran espíritu de solidaridad reina entre ellos; saben entenderse porque pueden comprenderse. Es una realidad contra la que se estrellan las burlas de los tradicionalistas y de cuantos por sistema no se dejan convencer. Sería suficiente proseguir y extender una experiencia ya vieja y que ha sufrido sus pruebas. ¿No podrá el Sr. Briand, disponer que se autorice por el Ministerio de Ins-

trucción Pública la enseñanza del esperanto en todas las escuelas públicas o en aquéllas en que fuese posible?

Por tanto, no esperemos todo del Estado-Providencia. Pongamos nuestras manos en la obra lo antes posible»...

Ernest Archdeacon, ferviente apóstol del automóvil primero, de la aviación después, y siempre del esperanto, al que sobre todo debe mucho la aviación, ha dicho repetidas veces: «La Aeronáutica, a consecuencia de las relaciones que engendra entre los pueblos todos, acarrea al esperanto una justificación que se hace más patente y más sólida de día en día.»

ASTURIAS

SONETOJ

Ho, kamparo ĉarma, rava, trankvila
kun mistika absoluta sereno,
kies belsmeralda verdo aprila
estas nuancata de l' rosmareno,

de krataga la rozeto humila,
de l' lavendo, de l' irid' kaj jasmeno,
de l' violo, kvankam kaŝe, belbrila;
de l' lekanto. . Ho, mirinda edeno!

Kie ĉie dise staras kampdomo,
apud kiu kamparano laboras;
ĉirkaŭ kiu bóske arbo de l' pomo

tre mirinde kaj ravante plenfloras;
plena de saniga arbararomo,
kaj en kiu la malĝojo, do, foras.

* * *

Ho, mirinda ĉiam verda kamparo,
kies altaj montoj ombre grizbluas,
inter kiuj la riveroj sen baro
ĉu torente aŭ kviete trafluas

oferiĝi ĉe l' potenca najbaro
de la lando, kiu ĉiam ĉu bruas
milde, ĉu tre furioze; ĉe l' maro,
kiu landon kisas aŭ vel frapskuas.

En ĉi tiu ĉarma lando la grilo
kvazaŭ psalmkantadas al la ĉielo
sub palpebrumanta milda la brilo

de ravege brilantaj la steloj;
kaj sub tiu de la sun', kun subtilo,
zumas kaj zumadas oraj abeloj.

* * *


Ho, mirinda lando! Danku la Dion,
kiu komplezeme certe cin benis,
kaj eĉ por liveri al ci, ja, ĉion
tute malavare ne sin detenis.

Font', arbar' kaj maro, glormelodion
kantas en la land', al kiu altrenis
la riĉeco homon, kies pasion
por la land' neniam foro deprenis,

ĉar virinparolo estas susuro
alloganta; ĉar aŭdante ĝin, miro
de la hom' fariĝas kora plezuro,

ama nekontraŭstarebla l' altiro,
nerompebla ĉiamdaŭra la ŝnuro
lin liganta al la hejma deliro!

Julio Mangada Rosenörn



La Kapo de l' Mortinto (Montserrat)

PRI LA NOV-ORGANIZO DE LA ESPERANTO-MOVADO

Vere la tuta esperantistaro sopiras al nova tutmonda organizo, sed la sopiro estas al kiel eble plej simpla kaj malmultekosta organizo, kapabla por ke kiu ajn esperantisto, spite de sia plej granda malriĉeco, povu esti ĝia membro. La Komisiono por Unuecigo al tiu celo en Budapeŝt, dum la XXI^a Kongreso, laboris pri la afero kaj ellaboris raporton, el kiu jen elĉerpitaĵo *pri la financa flanko*: «Kiom la izola esperantisto elspezas jare por kotizo al grupo, nacia societo, U. E. A. kaj al faksocietoj, por la aĉeto de libroj kaj gazetoj ĉiuspecaj? Ne estas facile respondi tiun ĉi demandon, sed ni taksu la elspezon je minimume 4 sv. fr. monate, tio estas 48 sv. fr. jare. Kiom da esperantistoj ekzistas, pri kiuj ni povas ŝupozi, ke dum la finorganizado de nia movado ili estos pretaj pagi al ni ĉiujare 48 sv. fr.? Pri la unua parto de tiu ĉi demando la statistiko de Prof. D-ro Dietterle, Direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, kompilita laŭ peto de la Internacia Centra Komitato, ebligas apogadon. Laŭ tiu ĉi statistiko estas fidine konstatita la ekzisto de rondcifere 130.000 esperantistoj organizitaj aŭ izolaj en la tuta mondo. Sen optimisme prenante de tiu ĉi cifero nur trionon, do rondcifere 43.000 esperantistojn, ni atingas 43.000×48 sv. fr., do entute 2.064.000 sv. fr., aŭ rondcifere du milionojn da sv. fr. Tio certe estas sumo per kiu, laborante ŝpareme, oni povas atingi ion. Kion nun la esperantisto ricevas por tiu ĉi sumo? La malmulto, kiun povas doni al li la grupo kaj la landaj organizacioj ne havas signifon, ĉar nur malmultaj landoj posedas valoran asocian organon... Sekvas pri tio, kion donas U. E. A., kio estas altvalora laŭ la Komisiono, kaj estus multe pli per la unuecigo. Ĉi tio estas revo de la Komisiono, kiun la hispanoj povas kompari kun la fabelo pri la laktovendistino, kiu, irante sur la vojo al la vendejo, portante la kruĉon da lakto sur la kapo, kaj farante kalkulojn, faletas, perdas la ekvilibron kaj, pro ĉi tio, la kruĉo falas kaj rompiĝas, kaj la disversiĝo de la lakto sur la vojo malaperigas la revon. Tre atentindaj gravaj faktoj elpruas evidente la revon nerealiebla: «Heroldo de Esperanto» petadas kaj petadas pli da pagantaj abonantoj por vivadi, dirante ne estas sufiĉaj la nuntempaj pagantaj abonantoj, proksimume 3.000; U. E. A., spite de

sia jam sufiĉe longedaŭra ekzistado, ankaŭ plendadas, ĉar ĝi ne atingis ankoraŭ 10.000 membrojn; ĉiuj eldonistoj plendadas pro nevendado de libroj; la nombro da kotizoj pagataj ne nur de la esperanta vidpunkto estas sufiĉe granda por la plimulto el la esperantistoj, kiuj ĝenerale estas malriĉaj kaj devas multe atenti la gravajn nuntempajn vivcirkonstancojn, kiuj altiĝas pli kal pli.

Sed estas necese komentarii la maljustaĵon, kiun vidigas la elĉerpitaĵo, dirante: «Kion nun la esperantisto ricevas por tiu ĉi sumo? La malmulto, kiun povas doni al li la grupo kaj la landaj organizacioj ne havas signifon, ĉar nur malmultaj landoj posedas valoran asocian organon». Ĉu oni pretendas malaperigi grupojn kaj landajn asociojn? Grupoj, regionaj asocioj kaj landaj organizacioj, estas la granda forto de nia movado, estas la potencaj antaŭenpuŝiloj de nia afero, kaj ĉie tio, kion ili donas al siaj membroj estas grandsignifa kaj altvalora, se ne materie, morale; kaj plenuminda kaj nepre plenumota devo de esperantisto estas fortigi siajn grupon, regionan gruparon aŭ asocion kaj tutlandan organizaĵon, ĉar tiamaniere li efike agos por la triumfo de nia idealo, fortigante la tutmondan movadon. Oni ne povas mortigi la iniciativojn de tiuj organizaĵoj, sed male stimuli ilin: ekzemple, en Hispanujo estas grupoj, kiuj eldonas bultenon ĉiumonatan krom la gazetoj de la regiona Federacio kaj de la tutlanda Asocio, kaj per siaj bultenoj la grupoj elpruvigas sian entuziasmon kaj sian forton, kaj ili meritas laŭdojn.

Ne estas prava la raporto de la Komisiono dirante: «Ni troviĝas en situacio, en kiu temas pri vivo aŭ morto de nia movado. Tiel, kiel marŝis la aferoj en la lastaj jaroj, ni senkondiĉe proksimiĝas al bankroto». Mi male, asertas ke la movado iras antaŭen, kaj ke ĝi, tial, ne bankrotos. Tio, kio okazas, estas, ke de la Kongreso de Helsinki, la afero ne iras bone, ĉar U. E. A. enmiksiĝis en la Esperanto-Movado laŭ formo ne kontentiga por la plimulto, arogante al si forton kaj rajton, kiujn ĝi ne havas; kaj, pro tio, la solvo estas tute pli simpla kaj efektivebla: U. E. A. daŭrigu sian ekzistadon kaj funkciadon same, kiel antaŭ la Kontrakto de Helsinki; kaj la esperantistoj kun la Akademio, flanken de U. E. A. kaj en frata rilato kun ĝi, starigu la tutmondan unuigon.

Ankaŭ ne estas prava la raporto pri la jeno: «Tre grava ĉa-

pitro estas la *naciaj societoj*. Ĉiu nacia societo devas havi oficejon, en kiu pagitaj oficistoj okupas sin pri la taskoj de la koncerna teritorio. La kostojn por tiuj naciaj oficejoj devas plene porti la Centra Direkcio». Ĉu ni devas pagi la Centran Direkcian kaj ĉi tiu pagi la nacian oficejon?

Antaŭ ol respondi la demandon konsciu, ke, koncerne la Hispanan Esperanto-Asocion, la argumento estas falsa, ĉar nia Asocio *ne havas pagitajn oficistojn*; sed respondante, ŝajnas al mi pli multekosta la solvo donita de la raporto, ĉar hodiaŭ ni starigas oficejon ĉe la hejmo de kiu ajn el ni, kvankam oficiale estu nia loĝejo tiu de la Hispana Ruĝa Kruco, kiu sindoneme akceptis nin de antaŭ multaj jaroj. Aliparte, ni ne volas ricevi sumojn de la Direkcio, ĉar ni volas esti memstare kaj administri nian monon por nia enlanda esperanto-laboro, kaj mi opinias, ke same okazos al francoj, germanoj, japanoj, k. t. p.

La raporto ne prave parolas pri la «*jam ekzistantaj organizaĵoj* unuavice la *nuna UEA*» ĉe la vidpunkto de la unuiĝo, kvankam laŭdinda estas la celo de la Komisiono. Mi opinias: ke estas neeble unuiĝi la nuntempajn ekzistantajn organizaĵojn, ke ni devas lasi ilin agi libere eĉ ne bari la vojon al novaj, kaj ke UEA sendependiĝu, rehavigante al si antaŭan situacion; sekve ni starigu la Tutmondan Esperanto-Unuiĝon (mi akceptas kiun ajn nomon) transformante la Internacian Centran Komitaton, al kiu aliĝu la esperantistoj per pago de *unu svisa franko jare*, ricevante la membrokarton. Malmultaj esperantistoj rifuzos ne aparteni al la granda universala esperanto-movado pro la malgranda kotizo, kaj certe grupoj, regionaj kaj tutlandaj organizaĵoj, penados por ke, aliaj membroj apartenu al la tutmonda organizaĵo, kies Komitato estos en konstanta kaj amika rilato kun la enlandaj asocioj kaj laŭ eblo kun la ceteraj internaciaj organizaĵoj, kiel UEA, IKUE, SAT, k. c. Tiu malgranda kotizo kaj respekto al individuaj entuziasmoj por arigi loke regione, nacie, profesie, religie, k.t.p., laŭ memdecido, estas vere firma bazo por fruktodona tutmonda organizaĵo.

Pravega estas la raporto de la Komisiono pri la konkero de la lernejo. Pri ĉi tio la hispanaj esperantistoj jam sufiĉe faris, ni iomete firme kaj sukcese antaŭeniris al tiu celo: laŭ Reĝa Ordono de la Ministerio de Publika Instruado kaj Belaj Artoj, de

la jaro 1911, ni povas klarigi esperanton en ĉiuj intruejoj de la Ŝtato, kaj la atesto pri esperanta kapableco estas OFICIALA MÉRITO; de antaŭ kelkaj jaroj, la Ministerio oficiale donas al nia Asocio jaran subvencion, kaj ĉiujare ordonas, ke Inspektoro por Instruado, de Madrido, inspektu, ekzameni, la laboron de la Asocio kaj informu oficiale pri ĝi, kaj la Asocio devas sendi oficiale raporton pri sia agado kaj kalkulojn pri la kasstato; la Ĝenerala Direkcio por elementa instruado de la Ministerio jam, du fojojn, oficiale decidis esperantajn kursojn por geinstruistoj de Madrido, kaj decidis pri samaj kursoj jam petitaj por geinstruistoj en aliaj urboj; La Ministerio donacis belajn ilustritajn altvalorajn librojn por premii la Lernejojn kiuj partoprenis la Internacian Ekspozicion de Lernejoj Laboritaĵoj, kiun sukcesplene organizis la Loka Komitato de Oviedo por nia VIII^a Nacia Kongreso, kiun oni devas imiti en ĉiuj landoj, ĉar ĉi tiuj ekspozicioj estas bonega kaj fruktodona procedo por altiri la atenton de la geinstruistaro, kaj mi reprofitas la okazon por re-laŭdi la simpatian kaj altvaloran iniciativon de niaj samideanoj de Oviedo; la Prezidanto de la hispana Registaro, Ĝeneralo Primo de Rivera, akompanate de la Ministro de Publika Instruado, vizitante la Foiro de Gijon (gravega industria urbo de Asturias, kun vastegaj kaj tre gravaj havenoj-malnova kaj nova-), estis mirigata de la vasta esperanta stando pro la amaso da esperantaĵoj ĉiuspecaj elpruvanta la gravecon de nia movado kaj la utilon de la lingvo, kaj sin turnante al la Ministro esprimis la neceson helpi kiel eble plej la aferon, pro kio la Ministro sciigis al la Prezidanto, ke la Ministerio jam donas subvencion de antaŭ kelkaj jaroj, sed pro la elpruvo pri la graveco de la afero per la ekspozicio, konsciante ĉi tiun gravecon, la subvencio devos esti pli alta. Nun ni atendas novajn kaj gravajn decidojn. Ĉio ĉi estas akirita dank' al la laboro de Hispana Esperanto-Asocio, kaj evidentigas la utilecon de la plej simpla aro el samideanoj (grupo de Gijon, per la Ekspozicio ĉe la Foiro), en plej malsimplan (Astura Federacio, per organizo de la Kongreso kaj I^a Internacia Ekspozicio de Lernejoj Laboritaĵoj, por kiuj preskaŭ nur la lokaj esperantistoj de Oviedo agis), en plej malsimplan (Hispana Esperanto-Asocio enkalkulanta la tutan teritorion).

Ĵus verkindo la antaŭon, mi ricevis «Espero Katolika», kiu

aperigas artikolon, kies enhavo estas argumento praviganta miajn, kaj tute certe ĉie Asocioj kaj esperantistoj opinios same.

Julio Mangada Rosenörn

EL SIBIRIO

Problemo pri granda norda vojo inter riveregoj de Sibirio (*Objo, Enisejo*) kaj Eŭropo per Nordpolusa maro estas brile solvita per helpo de modernaj glacirompantaj ŝipoj similaj al famo «Krasin». Nun oni povas facile veturi vaporŝipe al profundoj de Sibirio kaj eĉ el stepoj de Mongolio en Londonon. Ĝis nun la vojo estis barata de grandaj ofte tute netraireblaj glacioj, kiuj amasiĝas en tiel nomata *Maro de Karo* (*Karo* estas rivero, kiu fluas de Uralmontaro, kaj formas limon inter Eŭropo kaj Azio. Sed «Krasin» pruvis, ke bona glacirompanta ŝipo povas facile senglaciigi la vojon eĉ por grandaj ŝipkaravanoj. Komencante de la jaro 1920 regule ĉiujare al riveregoj *Okjo* kaj *Enisejo* en julio-aŭgusto el Eŭropo venas ŝipkaravanoj kun diversaj varoj por Sibirio kaj Mongolio, kaj forveturas reŝarĝitaj de sibiriaj lignoj kaj feloj. Post ĉirkaŭpolusa cirklo estas fonditaj *Nova Obj-haveno* kaj *Enisej-haveno* por marŝipoj. Tien ĉi venas riversipoj el arbar-oceano de Sibirio kaj eĉ el stepoj de Mongolio per riveroj *Selengo*, lago *Baikal*, *Augaro*, *Enisejo*, per *Irtiŝ* kaj *Objo*, kaj revenas reŝarĝitaj de eŭropaj varoj. En oktobro de nuna jaro «Krasin» jam finis sian 104-tagan laboron en glacioj de Nordpolusa maro kaj bone revenis Leningradon. Ĉiuj 130 ŝipanoj estas tute sanaj malgraŭ 3-monata peniga laboro kaj izoleco (klimato de Polusa maro estas mirinde saniga. Tie eĉ banigo en glacia akvo malofte kaŭzas malvarmumon. «Krasin» kondukis tra glacioj ĉirkaŭe 40 marŝipojn diversnaciajn kaj dum sia laboro vojiris ĉirkaŭe 18.000 kilometrojn. Per helpo de glitiŝipo nordoriente de *Enisej-golfo* estas eltrovita grandaro da novaj insuloj.

El «Sennaciulo»

ENLANDA KRONIKO

Madrid.—La 24.^{an} de novembro lasta, okazis propagandfesto en la Norda Socialista Klubo kaj parolis samideanoj Calahorra kaj Redondo trafante bone la atenton de la ĉeestantaro per evidentaj elpruvoj pri la utileco de la lingvo, kaj je la fino oni malfermis enregistron por kurso.

La Madrida Laborista Grupo starigis kvar kursojn: du ĉe la Popoldomo (lunde, merkrede kaj vendrede, ĉiusemajne, de la 7^{1/2} ĝis la 8^{1/2}, kaj de la 9.^a ĝis la 10.^a; trian oni klarigas ĉe la Suda Socialista Klubo (strato Valencia, 5. Ĉiumarde-ĵaŭde-sabate, de la 9.^a ĝis la 10.^a vespere), kaj kvaran ĉe la Norda Socialista Klubo (str. Hernani, 15. Ĉiumarde-ĵaŭde-vendrede, de la 7^{1/2} ĝis la 8^{1/2}. Partoprenas la kursojn 112 gelnantoj. Estas celo de la Grupo malfermi kursojn en Vallecas, Tetuan kaj Chamartín, apudaj vilaĝoj kvazaŭ kvartaloj de Madrido.

La Grupo kunvenas ĉiumonate je la 1.^a kaj 3.^a sabatoj ĉe la Popoldomo (kafejo) post 10.^a vespere.

La Hispana Ligo de Esp.-Fervojistoj daŭrigas sian sukcesantan laboron. La Komitato konstante laboras por interesigi la altrangajn postenulojn de la Ferv.-Kompanioj.

La Grupo «Antaŭen» decidis por intensigi sian progandlaboron starigi diversajn fakojn por la instruado, gazetinformoj, festojn k. t. p.

Zaragoza.—Fruktodona rezultas la poŝtakurso starigita de la Grupo «Frateco» kaj gvidata de S-ro Jozefo Oros. Ĉi tiu havis grandan ŝancon varbante instruiston, S-ron Juan Perez Cañete, de la nacia lernejo de Sisamon, ĉar dum malmulte da tempo li sin kapabligis esperante eĉ fariĝis fervore agema propagandisto varbanta novajn samideanojn en Sisamon, kaj poste en Monreal del Campo, kie li nune loĝas, kaj en Teruel. Laŭdindega estas la laboro de ĉi tiu nova samideano kaj ĉiuj imitu lin.

En la grupejo de «Frateco» disvolviĝadas la kursoj kaj la esperanta laboro tute normale kaj sukcese.

Tute same okazas ĉe la grupejo de la ĵus fondita «Zaragoza Esperantista», ĉar, malgraŭ sia ekfunkciado, ĝi kalkulas jam cent membrojn proksimume kaj vidigas grandan prosperecon.

Cáceres.—Nia kompetenta kaj agema samideano S-ro Soler Valls sukcese daŭrigas sian ĵurnalpropagandon kies frukto-dono jam vidiĝis, ĉar, ĉe la Ateneo funkciadas kurso gvidata de li.

Ni danku lin tre kore, ĉar li konkeris novan lokon al Esperanto.

BONVOLU SENDI NOVAĴOJN PRI LA MOVADO

VERO MONTRIĜAS SPITE DE ĈIO

Pasintan jaron, por elpruvi utilon de la BES-Adresaro por la hispanaj samideanoj apartenantaj al H. E. A.; por elpruvi, ke per tiu Adresaro ni devas solvi la decidon de la Kongreso de Sevilla, ĉar per ĝi ni havigos al ni kun la nomaro, adresaro, profesiaro kaj interŝanĝdeziroj de la Heaanoj, pli ol milon da adresoj de esperantistoj en la tuta mondo, al kiuj jam rekte nin turni laŭ emoj kaj plaĉo, mi enregistris en ĝin nomojn kaj adresojn de la subtenantojn de «Hispana Esperanto» kaj disdonis 200 BES-Adresarojn, pagante el mia poŝo la elspezojn. Efektive, mi scias el multaj gesamideanoj, ke ili kun granda kontento ricevis poŝtkartojn el diversaj landoj kaj uzis la BES-Adresaron por la interkorespondado. Estas necese nur pensi logike por konscii la gravecon de la BES-Adresaro, la utilon kaj eĉ la ŝparon profitante ĝin por H. E. A., spite de sistemaj kontraŭstaroj ies.

J. M. R.

VERKARO DE JULIO MANGADA ROSENORN

EL ESPERANTO AL ALCANCE DE TODOS. Premiada con *Mención Honorífica y declarada de utilidad* por el Ministerio del Ejército, según Reales órdenes de 16 de abril de 1912 y 8 de septiembre de 1916 (*Diarios Oficiales* números 88 y 203) respectivamente. Tercera edición, corregida, simplificada y mejorada con gráficos y tablas, con temas y abundante vocabulario. Precio: 1,50 pesetas.

HELPANTA TEMARO POR LERNIGI RAPIDE ESPERANTON. 32 paĝ., $13\frac{1}{2} \times 19$ cm. Tute en Esperanto, laŭ sistemo el demandoj kaj respondoj, enhavas dekok temojn: La saluto; Pri la tempo; La horloĝo; Pri fumado; Korespondado; En kafejo; Ĉeesti teatran prezentadon; Ekskurso al la marbordo; Vespermango en la restoracia vagono; Alveno al marborda urbo; Ili vizitas la urbon; Ili vizitas ŝipon en la haveno; Marekskurso; La familio; La homa korpo; Nutraĵoj; Bestoj; La amikoj de la homo, per kiuj lernanto konatiĝas kun la tuta disvolvigo de la vivo. La riĉega enhavo, la sistemo, kaj la simpla kaj korekta stilo meritis altvalorajn opiniojn de recenzistoj.

Je la fino aperas «Preĝo sub la verda standardo» de la Majstro, D-ro Zamenhof, Prezo: 0,75 centimojn.

PRI HISPANUJO KAJ ĜIAJ POPOLKANTOJ. POPOLKANTARO DE MURCIA. 52 paĝ., $13\frac{1}{2} \times 19$ cm. Tute en Esperanto. Tre interesa verko pri formado de la teritorio, pri la indiĝenoj kaj unuaj invadoj kaj pri la nomo HISPANUJO; pri diverseco de la lando kaj tial de la riĉa abundega muzikfolkloro, kaj fine pri la popolkantoj de Murcia kun muzikaĵoj por piano kaj kanto. Rimarkindaj recenzoj estis al ĉi tiu verko, kiu ankaŭ havas bildojn. Prezo: 1 peseton.

FERDINANDO VI^a KAJ FARINELLI. 32 paĝ., $12\frac{1}{2} \times 19$ cm. Tute en Esperanto. Tre interesa romano en prozo kaj verso, laŭ simpla zamenhofa stilo, per kiu leganto konas epizodojn de la vivo de la grandanima reĝo, kiun preskaŭ malsaĝigis melankolio ekspluatata de politikuloj, kaj kiun savas Farinelli per sia muzikarto kaj konsiloj. Ĝi estas kunulino inda je la Aliaj verkoj. Prezo: 0,75 centimojn.

AVILA. 64 paĝ., 12×17 cm. Tute en Esperanto pri historio kaj arto de la urbo; biografioj de la Eklezia Doktorino kaj

tutmond fama mistika verkistino Sankta Tereso, kaj de Alonso de Madrigal (unua duono de la XV^a jarcento), episkopo de la urbo, nomata *Oceano de la Sciencoj*. Ankaŭ ĝi parolas pri tradicio pro martiroj, kaj enhavas 30 belegajn bildojn de la urbo pri ĉefaj monumentoj. Prezo: 1 peseton.

EL MODERNA HISPANA PARNASO. 32 paĝ., $13\frac{1}{2} \times 19$ cm. En-tenas tradukitajn versaĵojn el famaj modernaj hispanaj poetoj kaj ilustras la libron 20 belegaj bildoj koncernantaj ĉu la poemon, ĉu la landon de la poeto, ĉu la urbon (Sevilla-Granada-Santiago-k. c.). Fidela estas la traduko, konservante la formon, silabnombron de la versoj kaj rimon. Prezo: 1 peseton 15 centimojn.

DU JUNAJ FRAŬINOJ kaj KORNELIINO. 72 paĝ., $13\frac{1}{2} \times 19$ cm. Tiel estas titolataj du noveloj el la modelaj de la tutmond fama aŭtoro de l' KIHOTO, Mikaelo de Cervantes Saavedra, kiujn ni prezentas en esperanta vesto, por kio la tradukinto celis konservi laŭ eblo formon kaj stilon de la verkisto. La unua pritraktas intereseĝajn aventurojn pro enamigintaj junaj nobelulinoj, kiuj decidas serĉi la amaton forkurintan, por kio ili sin decidas sin survesti vire. La dua pritraktas same intereseĝajn aventurojn en Italujo pro fidela amo de altranga itala nobelulino spite de la kontraŭstaro de ŝia frato. Prezo: 1 peseton 50 centimojn.

DON KIHOTO, Unua kajero, 32 paĝ., $12\frac{1}{2} \times 17\frac{1}{2}$ enhavas Antaŭparolon kun ĉiuj versaĵoj fidele tradukitaj, konservante formon kaj rimon (du poemoj kaj ok sonetoj) kaj la unuan ĉapitron. Estas celo de la tradukinto daŭrigi la tradukon, ĉi tiun liverante per kajeroj. Prezo: 0,60 centimojn.


Ĉiu membro de Hispana Esperanto-Asocio povos aĉeti la tutan kolekton, kiu valoras 8 pesetojn 25 centimojn PO KVIN PESETOJ, antaŭpagante kaj dirante la numeron de sia Membrokarto. Mendante aparte la librojn, Membro de H. E. A. atingos KVARONON da rabato.

Sendu la monon poŝtĝire aŭ per poŝtmarkoj en rekomendita letero.

Por fremduloj la prezoj notitaj estas laŭ valoro de svisa franko, antaŭpagante per poŝta ĝiro internacia aŭ per respondkuponoj de U. E. A. Tutan kolekton oni liveros po SES svisaj frankoj; sed al Grupoj, Asocioj, Librovendistoj, mendantaj al-

menaŭ KVIN kolektojn, oni liveros ilin po DUDEK sv. fr.; mendantoj DUDEK ekzemplerojn el kiu ajn verko faru proponon. Oni sendos la librojn poŝtrekomendite.

Mendanto sin turnu al la verkisto: Glorieta de Bilbao, 5.—Madrid.—Hispanujo.



HISPANA ESPERANTO-ASOCIO gravege progresas kaj plenumas la rolon por la disvastigo de Esperanto en la tuta lando; tial estas devo de Esperantisto aliĝi al ĝi kaj varbi por ĝi novajn adeptojn. La kotizo estas DU pesetoj (unua kotizo 2,50 pro la membrokartoj). Sendu la kotizon al la sekretario, S-ro Mariano Mojado, strato Abascal, 13, Madrid. Se vi sendus samtempe TRI pliajn pesetojn por subteni la propagandon per ĉi tiu gazeto vi ricevos akurate kaj ĉiumonate ĝin.

Eksterlandanoj, sendintaj KVIN sv. fr., ricevos la gazeton. Ĉiu sendu la monon poŝtgire al S-ro Mojado kaj enlandanoj povas pagi per poŝtmarkoj en rekomendita letero.

INTERŜANĜO nur po du specimenoj.

Gazeton, presaĵojn, materialon, k. c., sendu al la Redakcio.